Aŭstraliaj Esperantistoj

Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale

PLENUMITA 09/04/2020 Kvarcentsepdektria eldono (unua eldono 20/09/2011)

Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

Uzindaj ligoj *reta-vortaro* *Freelang Vortaro* *Plena Ilustrita Vortaro* *Duolingo*

Google Translate *Pasintaj AE eldonoj* *duolingo entute* *lingvohelpilo*

Esperanta Retradio *Esperanta himno* *PMEGramatiko* *openclipart.*

Oni povas meti sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

Entute 718,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo

Nun studas **279,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)
Nun studas **234,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)
Nun studas **205,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)
Nun preparas Esperantan programon por francoj. (Ekde junio 2020 ?)
Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde julio 2020 ?)

★★★

https://twitter.com/i/status/1245591199034929153 *Roger Springer*

★★★

silentas, kaj malaktivas, aŭ aktivas en aliaj manieroj kaj situacioj. Sed mi asertas, ke la agado de la ordinaraj homoj estas la sola maniero por havi sukcesojn. Alternative oni kunbatalas kun la partipolitika agado kun nur ŝajnsukcesoj. *Marcel Leereveld*.

MI NE RIPOZOS .

Mi ne ripozos ĝis kiam ĉiuj Esperantologoj scios la gramatikon de Esperanto perfekte, centprocente. Por la eŭroplingvaj tio implicas, ke ili sciu ke kelkaj el iliaj lingvoj, ekz. franca, germana kaj angla, havas tri participojn, kion la eŭropaj etnolingvistoj ne scias, nome la Daŭran Participon, ofte malĝuste nomata la Prezenca, la Pasivan Participon, kiu uzatas kun la helpverbo "esti" por formi ĉiujn tempojn de la pasiva voĉo, kaj la Pasintan Participon, kiu uzas la helpverbon "havi" por formi la Perfektan Tempon.

Tio implicas ankaŭ, ke ili sciu, ke necesas kaj jam haveblas unuvorta verbo por fari la Pasivan Voĉon en Esperanto. Tiu unuvorta verbformo por la Pasiva Voĉo inventatis antaŭ trideko da jaroj kaj uzas la sufikson "-ati" por tio. Oni inventis, ĉar oni antaŭ tiu invento ankoraŭ ne trovis ĝin. Oni (inkluzive de Waringhien kaj Kalocsay) decidis, ke tian sufiksitan unuvortan pasivan voĉon oni ne kapablus krei, ĉar AŬ la sufikso estus neologismo, kaj la Akademio ne akceptus ĝin, AŬ ĝi estus ekzistanta sufikso kun neuzeblaj signifoj, kiel "-iti" aŭ "-ati" aŭ "-oti", kiuj enhavas tempan signiferon, dum oni bezonis sufikson kun nur pasiva signifo.

Sed antaŭ trideko da jaroj iu trovis, ke Zamenhof uzis regulon kiu diras, ke oni povas decidi, ke se finaĵo aŭ sufikso havas pli ol unu signifero (ekz. la "a"-finaĵo de "patra" signifas KAJ posedon KAJ karakteron), oni rajtas deklari ke tia sufikso aŭ finaĵo havu nur unu el la du signiferoj, sed sub la jenaj du striktaj kondiĉoj: **1e**. ke tiu sufikso uzatos nur en unu speciala vortkategorio (*wordclass*), kaj **2e**. ke en tia vortkategorio la vorto ne, aŭ apenaŭ, estas uzata en Esperanto ĝis nun. La verba sufikso "-ati" korespondas al ĉi tiuj kondiĉoj se uzata, KAJ NUR TIAM, kiel verbo. Rezulte de tio ni nun havas la vortojn "sendatis, sendatas, sendatos, sendatus, sendatu, kaj sendati. Tio solvis la problemon de la laŭ Kalocsay en la Zamenhof'a Esperanto ne ekzistanta Verba Pasiva Voĉo (t.e. "estas punata" ne eblas ĉar "(estas) -ata" signifas nefinitan agon, kaj "estas punota" = Predikto kaj "estas punita" = Perfekto).

Tiuj kiuj ankoraŭ ne akceptis la novan laŭ-Fundament'an Pasivan Voĉon faras tion ĉar ili ne akceptas ke la sufikso "-ati" rajtas uzati kaj/aŭ ĉar ili ne akceptas ke ekzistas tia regulo ke oni rajtas redukti la signiferojn de finaĵo aŭ sufikso. Ili asertas, ke ne ekzistas kazoj kie Zamenhof uzis tian regulon, dirante ke en la ekzemplo de la signiforedukto ĉe la participoj uzataj kiel substantivoj (falanto = nur persono) temas pri la Regulo de Neceso kaj Sufiĉo. Tiel ke "falanto" = redukto de la plena "falantulo" ĉar estus klara ke "falanto" sufiĉas por "falantulo". Ili komplete misjuĝas jene: la finaĵoj "anto" kaj "ulo" ne havas la saman signifon, do "falanto" ne indikas la saman signifon kiel "falantulo kaj falulo". Klare tion klarigas P.A.G. en la fino de paragrafo 342 je paĝo 458:

"Inter 'anto' kaj 'ulo' kaj 'isto' ekzistas tiu diferenco, ke '–anto' signifas fojan, okazan faranton, '-ulo' la personiĝon de la respektiva aga ideo, '-isto' profesiulon. Ekzemple:
trompanto: kiu foje trompas;
trompulo: kies esenca karaktertrajto estas tromp(em)o;

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

trompisto: kiu vivas per trompo. “

Se P.A.G. jam mem diras, ke “trompanto” kaj “trompulo” ne havas la samajn signifojn, kiel ĝi povas aserti, ke “trompanto” estas mallongigo de “trompantulo” kio ja estas ulo? Tio ne eblas, kaj tial ne validas la aserto ke “trompanto” reduktus sian signifon al nur personoj per la Regulo de Neceso kaj Sufiĉo. Validigi la signifore dukton eblas nur per la (de Zamenhof uzata sed ne formulita) Regulo de Signifore dukto. Kaj tiu sama Regulo validigas redukti la signifon de “-ati” el de KAJ Pasivo KAJ Daŭro (Imperfekto) al NUR Pasivo. Tiel ke “La hundo batatas/is/os/us/u/i” estas la unuvorta Verba Pasiva Voĉo. *Marcel Leereveld*.

EKONOMIA POTENCO .

Mi legis, ke la kvar “komercrotoj” en Usono, kiuj komplete regas Usonon, pere de la Republika Partio kaj la Demokrata Partio, estas la jenaj:

1). La militista-industria komplekso. Prezidisto Eisenhower, en sia fama adiaŭa parolado diris en Januaro 1961 “La interligo inter la militistara kaj privata industrioj kreis politikan potencon tiom persvadan ke Usono kondamnatis al militaristigado,al senutilaj militoj, kaj al fiska malŝparo je tioma grandega skalo kiom multaj dekoj da trilionoj da dolaroj”.

2). La *WallStreet*-Vaŝingtona komplekso, kiu direktis la financan sistemon al regado ate de kelkaj politike potencaj *WallStreet*-firmaoj kaj ate de kvino da aliaj financaj firmaoj. Nuntempe preskaŭ ĉiuj kasistsekretarioj venas el de WallStreet kaj tien retroiras post deĵoro en la usona registaro. La proksimaj kunligoj inter *WallStreet* kaj Vaŝingtono igis la registaron finance helpegi la bankojn en financaj krizoj.

3). La komplekso de la potencaj petrolokompanioj “*Big Oil*” kaj la transportilistoj igis Usonon grandege importi petrolon kaj kaŭzi militan enfalujon en Centrooriento. *BigOi*l sukcese kontraŭadas la akcepton de pli puraj energiofontoj. La usona registaro subvenciadas la petrolkompaniojn per centmilionaj dolaroj.

4). La grandega medikamentindustrio, pli financriĉa ol la aliaj tri kompleksoj. La farmaciaj kompanioj tre altigas siajn prezojn, kaj krome ricevas financan helpon de la usona registaro.

Ĉu iu leganto povos doni al ni la kvar ekonomiajn kompleksojn en Aŭstralio aŭ alia lando?

Marcel Leereveld.

FLORRIPOZO EN MIA ĜARDENO.

Malmultaj arboj kaj aliaj plantoj nun floras en mia ĝardeno, ĉar estas ankoraŭ tro frue por la akacioj. Sed tre riĉe floras nun la du “tibuĉinoj” (*Tibouchina*, *Lasiandra*) kun violaj floroj. Ili floras dum la aŭtuno kaj parto de la vintro. Du aŭ tri malfruaj rozoj sekvas ilin. *Marcel*.

★★★

Demandoj

Kara Roger,

en AE 472 vi denove prezentas la ideon pri "Universala Pensio".
Interesus min, kion signifas "universala". Por ĉiuj homoj en unu lando?
Por ĉiuj homoj en la mondo?
Kaj interesus min ekscii, kiel kaj kie laŭ via opinio la mono por tiuj pensioj kolektiĝu. Kiel vi volas konvinki la nunajn superriĉulojn pagi por tiaj pensioj? Vi nur parolas pri plenkreskuloj, kiuj ricevu tian pension. Kio kun handikapitoj, kiuj ne estas laborkapablaj? Ĉu "Universala sanasekuro" estas parto de tiu pensio? Amike,

Peter Weide

Respondoj

Karaj,

Unue estas la demando. Kio estas mono?

Mono estas pecoj da papero, aŭ elektraj pulsoj en komputeroj.
Ĝi estas registro de via nivelo en la homa socio. Ĝi mem ne estas valora se la homaro ne kredas ke ĝi estas valora. La mondaj regantoj nun, sen problemo, kreas ĝin el la aero por batali la viruson, militojn, ktp.
Por funkcii bone, la sumo de la mono devas egali, plimalpli, la sumon de la riĉeco de la planedo (lando.) Tio estas varoj kaj homa laboro. Impostoj devas balanci la monon kaj la bezonojn.
Estas multaj proponoj en la reto por solvi tiun problemo.
La superriĉuloj kaj firmaoj plej ofte ne pagas altajn impostojn.
Impostoj devus esti (ĉu) 25% de ĉiu ricevata mono kaj la Universala Pensio devas esti (ĉu) 25% pli alta ol necesa ĉar oni pagas imposton por ĉiu ricevata mono.
Universala Pensio finfine estas por la tuta homaro. Unue oni devus komenci per lando
Ĉiuj je la aĝo de 16 jaroj ĝis la morto ricevos la pension.
Aliaj pensioj devas nuliĝi, sano devas esti sen kosta kaj do neniu ricevus rekompencon post akcidento ktp.
Altajn lukostojn oni solvos per kunloĝado de kelkaj kune (oni faras tion nun) aŭ oni trovu paglaboron por havi pli da mono kaj por aĉeti propan domon, ktp.
Ekzistas pli intelektuloj ol mi, sed plejparte la nuna sistemo donas al la pli intelektaj homoj avantaĝon.

La UBE ne sigifas ke oni ne povas labori por havi pli da mono kaj bonajn vivkondiĉojn.
Amike *Roger Springer*

★★★

situacion : neniu mona interŝanĝo povas okazi sen la sciigo kaj kontrolo de la bankoj. La impostservo tre ŝatas tiun kontrolon ĉar dank'al la bankoj klaras ĉu mi honeste deklaras mian enspezon aŭ ĉu mi friponas. Mi devas pagi la "*visa*" kreditkarton, kiun mi uzas , kvankam ĝi ne apartenas al mi. Kiam ajn mi pagas per mia kreditkarto , aldoniĝas iu elcento pro la servo de la banko. Se mi ĝiras monon al alies konto, ankaŭ tio estas pagenda. Finfine kiom da mono jare mi elpezas nur por uzi mian monon?

Kiam la interezo atingis ĝis 18% por depono en la banko, oni povis pensi ke oni gajnas en la afero. Sed nun kiam la interezo povas esti tiom malalta kiom 0.5 , ne por prunto kompreneble ! Eĉ povas esti neniu garantio ke la tuta sumo investita revenos al la posedanto kiam maturiĝos la investo.

Kio kaŭzis la financan krizon de 2008? Kiu devis "ripari" la sistemon? Kun kies helpo? Tiam estis dirite ke granda banko ne povas fiaski .

En Aŭstralio reĝa komisiono analizis kaj publikigis la kontraŭetikan konduton de bankoj. Ĉu okazis la logika sekvo: ŝanĝo en la rilato inter bankoj kaj homoj?

Ĉu la pandemio trudos iun ŝanĝon? *Franciska Toubale*

★★★

6. NETAKST: Ne Ekzistas Tia Afero Kiel Senpaga Tagmanĝo! (Angle, *TANSTAAFL: "There ain't no such thing as a free lunch.")* Iu devos pagi por la UBE. La valoro de tiu mono devenos de *ies* laboro, peno, neceso, volo aŭ malabundeco. Tiu valoro estis vera por iu, iam, se ne nun. Iu perdis sian monon. Tamen, kiu pripensos pri tio, kiam la ‘ŝajne-el-nenie’ mono alvenos en la konto, monaton post monato? s

7. Eks-ĉefministro Gough Whitlam iam skribis: *La vetistoj scias ke la ĉevalo kiu nomiĝas 'Moraleco' malofte pasis la cellinion, tamen la ĉevalaĉo kiu nomiĝas 'Memintereso' ĉiam kuris bone en la konkurso. ("The punters know that the horse named Morality rarely gets past the post, whereas the nag named Self-interest always runs a good race.")* Ĉu la motivo por UBE estas reala deziro por helpi senhavulon, aŭ avido por la mono de aliaj uloj? Ja, amo por mono estas la radiko de ĉia malbono.

Jen alia kialo. Mi ne volas ŝuldi ion al la registaro, aŭ eĉ havi senton de ŝuldado al l’ registaro. Tamen, se la registaro pagos min, tia ŝuldo (aŭ sento de ŝuldo) ekzistos. Ekzemple: mi nun laboras en ne-registara lernejo, sed la lernejo ricevas monon de la registaro. Do, kies instruplanon ni devas uzi? Similteme, kion la registaro postulos de ni, la pagotoj? “Tiu kiu pagas la ŝalmiston diktas la melodion.” *(“Whoever pays the piper calls the tune.”)* En demokratio, la popolo ne estu ŝuldanto de la registaro. Anstataŭe, la registaro estu servisto de la popolo.

Do, jen mia opinio! Tamen mi ja konsentas ke nia nuna ekonomio-sistemo ne estas sana.

Bondezire, *Marc Schmidt*

★★★

Do, sur unu el tiuj vojoj, aŭ stratoj, veturas tiuj du homoj. Du homoj bone kondutantaj kaj ankaŭ bone aspektantaj! Ĉe kaftrinkejo Adelajda la viro haltigas sian aŭton kaj ne nur li, sed ankaŭ lia najbarino eliras.

Ĉu tio ŝajnas bona al vi? Eble, sed eble ne! La najbarino tiam estis renversita de alia aŭto, kiu ne haltis antaŭ la kaftrinkejo. La najbarino falis mortinta sur la straton, aŭ eble sur la vojon. Nu, mi devas jam nun konfesi ke io tia preskaŭ neniam okazas en nia bona kaj amata urbo, Adelajdo. Sed tiun tagon tio okazis. Kaj tio okazis je granda teruro, ŝoko kaj terura surprizo al la viro. Li tute ne sciis kion nun faros bona, eĉ bonega homo. Sed subite aperis apud li polica aŭto. El ĝi iris du gepolicistoj, unu policisto kaj la alia policistino. Ili alproksimiĝis al la malĝojegulo.

'Kio estas via nomo?" demandis la policisto dum la policistino staris apude ridetante. Verŝajne ŝi pensis pri bongusta taso da kafo kaj io alia bongusta kaj manĝinda.

Tiam subite haltis alia polica aŭto apud ili. El ĝi eliris du aliaj policistoj. Unu el ili severmiene alparolis la du gepolicistojn: "Vi estas arestitaj", li diris. "Sed kial? demandis la policistino, "ni estas gepolicistoj kaj havas ja pli da rajtoj ol aliaj homoj". "Sed laŭ la nova leĝo, neniu rajtas kunveni en grupoj konsistantaj el pli ol du homoj", respondis unu el la aliaj policistoj. "Sed ni estas ja nur du personoj, ĉu ne?" demandis la policistino. " Sed kiuj do estas tiuj du, kaj kial unu el ili kuŝas sur la strato? demandis la policisto. "Ŝi estas mortintino", respondis la policistino. "Ĉu mortintino aŭ ne", respondis la policisto, "neniu povas nei, ke ŝi estas homo". "Homoj ne ĉesas esti homoj, kiam ili mortas! Kaj tiu ĉi viro, kiu staras ĉi tie, ankaŭ li estas ja homo, ĉu ne? Eĉ nia ĉefministro konfesus tion. Do, vi devus scii ke du plus du estas kvar. Kaj, laŭ la nova leĝo, neniu rajtas aperi en grupoj de pli ol du. Nia devo estas nun aresti vin, ĉu vi komprenas?

Tiam haltis alia polica aŭto apud ili. Du policistoj eliris kaj alparolis la nun tro grandan grupon da homoj: "Kian publikan kunvenon vi okazigas ĉi tie? Unu el Ili demandis. "Ni ĵus demandis la samon de tiu ĉi sinjoro", la policistino respondis.

Kaj tiel plu, kaj tiel plu, kaj tiel plu. Mi bedaŭras ke la historio estas senfina, sed tia estas la leĝo, bedaŭrinde, ĉu ne?

Mi do, por ne ripeti tion, kion mi ĵus skribis kaj kion vi ĵus legis, espereble kun granda ĝojo, finas la belegan, bonan kaj tre interesan historieton, kiu fariĝus ne nur historieto, sed eĉ historiego, se mi ne estus pensinta pri vi kaj via pacienco!

Bob Felby

★★★

Fakte, venis dekdu partoprenantoj, pli ol dum niaj kutimaj kunvenoj. Eĉ Amato kaj Rikardo kiuj translokiĝis al Kvinslando.
Sandor prezentis koronvirusajn ŝercojn kaj la afero sufiĉe bone funkciis.
Ni rekomendas fari la samon al aliaj grupoj. Tiel ankaŭ esperantistoj en aliaj ŝtatoj povas kunveni

Sandor Horvath

★★★

(3) 3ZZZ – SONARKIVOJ

Ni decidis translokigi la 3ZZZ sonarkivojn de Svetislav Kanacki. al Esperanto Domo en Sidnejo.

(4) ZOOM

Okazis bona monata kunveno pere de “Zoom” en Adelajdo. Ni proponas, ke aliaj grupoj faru la samon. Venontfoje ni klopodos kunmeti liston de diversaj Zoom kunvenoj tra Aŭstralio. Tiel ni daŭrigas nian tradicion kaj kulturon kaj ankaŭ esperantistoj el aliaj ŝtatoj povas partopreni.

(5)ESK

Ni refoje gratulis Andrew Woods kaj Terry Manly pri la produktado de nia lasta eldono de “Esperanto Sub La Suda Kruco”

Venonta kunveno 16an de aprilo 2020. *Sandor Horvath*

★★★

viruso, la IKU-programo, la UK-programo, la Membraro-raporto pri 2019 kaj pluraj aliaj.

3. La Ĝenerala Sekretario de UN publikigis alvokon por, en tiu ĉi decida horo por la homaro, redukti kaj eviti konfliktojn kaj militojn. UEA tradukis ĝin en E-on esperantoporun.org/urga-mesago-de-la-generala-sekretario-de-unuigintaj-nacioj/ kaj pledas por ke oni traduku ĝin en sian nacian lingvon kaj disvastigu nacinivele.

Fine, el pli vasta vidpunkto.

Por la tuta homaro tio estas tre malfacila tempo, sed ni memoru, ke ni renkontas tiun ĉi epidemion en multe pli bonaj cirkonstancoj ol estis en antaŭaj historiaj pandemioj. Ni havas modernajn servojn, medicinon, komunikadon, interreton.

La koronvirusa epidemio estas la plej severa de jarcento, sed fine ĝi estos venkita. Tiam la homaro, la socio kaj ankaŭ la Esperanto-komunumo havos ŝancon pliboniĝi. Espereble, ankaŭ kiam pasos la krizo, oni plu respektos, simpatios kaj estos pli pacienca kun la aliaj, loke kaj internacie. Ni estu pli modestaj, aprezemaj kaj konservemaj al nia socio, kulturo, medio kaj planedo.

Ankaŭ la E-Movado povos lerni de tiu historia kaj socia leciono: per retaj rimedoj kiel Skype, Zoom, Facebook k.a. havi pli da interretaj kontaktoj nacie kaj internacie, dividi niajn renkontiĝojn kaj kongresojn kun e-istoj kaj ne e-istoj tra la tuta mondo kaj tiel disvastigi la konon kaj la mesaĝon de la Internacia lingvo Esperanto. Sendis al AE *Katja Steele*

★★★